# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-14 n-ro 355


# Fukuŝima: Glaciigita termuro finkonstruiĝis



Sirio: en areo sieĝata apud Damasko, malsatego disvastiĝas pro manko de humanitara konvojo

Komputiloj por solvi mondan nutroproblemon

La koro de Chopin, de 170 jaroj en poto, diras la kaŭzon de lia morto

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

## Glaciigita termuro finkonstruiĝis
*Poluita akvo p. 03*

## Sirio: en areo sieĝata apud Damasko, malsatego disvastiĝas pro manko de humanitara konvojo
*UN timas katastrofon p. 05*

## Nombro de mortintoj kreskis ĝis 207 en Irano post tertremo
*7,3-magnituda tertremo p. 06*

## Kunikloj ĉefrolas en pola kampanjo pri naskemo
*Loĝantaro malpligrandiĝas ekde fino de la 1990-jardeko p. 06*


## Komputiloj por solvi mondan nutroproblemon
*Optimuma ekspluatato p. 07*

## La koro de Chopin, de 170 jaroj en poto, diras la kaŭzon de lia morto
*Ripozi trankvile en sia tombo jam delonge ne havas garantion p. 08*

## Hodiaŭe
*Adam Oehlenschläger; August Šenoa; kaj Birdo p. 09*

# Glaciigita termuro finkonstruiĝis

Senĉese enfluas multe da akvo el la najbara monto en la terenon de la kvar reaktordomojn kaj radioaktiviĝas. TEPCO devas pumpi kaj meti tiun akvon en grandajn akvujojn. Antaŭe en la tereno de la nuklea centralo de Fukuŝima estis plena de verdaĵoj, sed nun tie staras mil akvujoj. Kiel solvi tiun problemon estas plej grave por TEPCO.




Por tio, TEPCO komencis konstrui glaciigitan termuron 1,5 kilometrojn longan ĉirkaŭ la 4 reaktordomoj. Oni enpikis 1568 tubojn 30 metrojn profunden en la teron kaj tra tiuj tuboj oni cirkuligas -30-gradan akvon, tiele la tero ĉirkaŭ la tuboj glaciiĝas kaj faras muron. Ĝis marto 2016 TEPCO konstruis 99% de la muro, kaj la 22an de aŭgusto 2017 Nuklea Reguligada Aŭtoritato permesis al ĝi fermi la restantan parton 7 metrojn longan.

Tamen la efiko por malmultigi la poluitan akvon estas nebula. Krome TEPCO bezonas 1500 milionojn da enoj (15 milionojn da eŭroj) ĉiun jaron por bonteni la muron, kaj krome laboristoj devos multe elmetiĝi al radioaktiveco. Multaj homoj timas, ke TEPCO devos preskaŭ eterne elspezi tiom da mono sen multe da efiko, kaj rekomendas, ke ĝi esploru alian rimedon pri la poluita akvo.

**Kiel trakti la konservitan akvon**

Ankaŭ la konservita poluita akvo estas problemo. TEPCO purigas la poluitan akvon per la maŝino nomata ALPS, sed eĉ poste en tiu akvo ankoraŭ restas unu speco de radioaktivaĵo nomata tricio. Oni diras, ke tio ne estas danĝera al la naturo kaj forĵetebla en la maron, sed fiŝistoj en Fukuŝima forte kontraŭas la forĵetadon de tricio, ĉar tiam denove reviviĝos malbona famo de Fukuŝima.

Eĉ se la fiŝistoj aprobos la forĵetadon, por tio TEPCO unue devos maldensigi la akvon. Sed tio signifas, ke la kvanto de la akvo multobliĝos. Por forĵeti tiele maldensigitan akvon, ĝi bezonos multegon da jaroj.

Se oni ne povos solvi tiun akvoproblemon, akvujoj senĉese multiĝos. Poluita akvo estas la plej granda kaj grava problemo, sed oni ne havas efikan rimedon por solvi ĝin.

**Fandiĝintaĵoj**


En la tri detruitaj reaktoroj restas fandiĝintaĵoj, sed estas malfacile scii, en kia stato ili restas, ĉar estas tro radioaktive kaj homoj ne povas proksimiĝi al la reaktoroj. La 27an de julio TEPCO klarigis, ke oni konstatis fandiĝintaĵojn en la fundo de la reaktoro n-ro 3.

Oni uzis akvorezistan roboton, ĉar tiu reaktoro estas plena de akvo. En la fotoj fotitaj de ĝi vidiĝas maso kiel roko, aĵoj similaj kiel ŝtonoj kaj sablo, falintaj krado kaj tuboj jam rustintaj. Tiuj aĵoj estis faritaj el fandiĝintaj nukleaĵoj, konstrumaterialoj ktp.

Oni supozas, ke 360 tunoj da fandiĝintaĵoj estas en rektoro n-ro 3. TEPCO planas elpreni fandiĝintaĵojn el unu el tiuj tri reaktoroj en 2021.

**Elektota fina deponejo de nukleaĵoj**

La registaro publikigis la mapon pri la elektota fina deponejo de nukleaĵoj la 28an de julio 2017. Ĝis nun ĝi atendis memvolan kandidatiĝon de urboj, sed tia elektomaniero tute ne funkciis, tial ĝi ŝanĝis la politikon kaj mem faris mapon pri taŭgaj lokoj kaj netaŭgaj lokoj por la deponejo.




Laŭ la klarigo, netaŭgaj estas tiuj lokoj, kie:

1. estas aktivaj vulkanoj en la radiuso de 150 kilometroj;
2. estas aktivaj faŭltoj proksime;
3. okazas tererozio aŭ terelstarado;
4. la tertemperaturo estas alta;
5. la subtera akvo estas tre acida;
6. la tero estas mola;
7. estas spuroj de lafofluoj, kiuj okazis pli ol 10 000 jarojn antaŭe;
8. estas karbominejoj, petrolkampoj aŭ gaskampoj.

Taŭgaj estas tiuj lokoj, kie tute ne ekzistas ĉi supre menciitaj kondiĉoj kaj inter tiuj "taŭgaj" lokoj, tiuj laŭ la marbordo estas la plej taŭgaj pro mara transportado de nukleaĵoj. Tiuj taŭgaj lokoj kovras 60% de la lando. La registaro estas preta donaci 2 000 000 000 enojn (20 000 000 eŭrojn) al la urboj, kiuj akceptas «paperan esploradon» kaj maksimume 7 000 000 000 enojn (70 000 000 eŭrojn) al la urboj, kiuj akceptos «pli da esplorado».

Oni planas jene forĵeti la nukleaĵojn:

1. Oni miksas nukleaĵojn kun vitro kaj faras mason (500 kilogramojn peza, 1,3 metrojn alta kaj 40 centimetrojn diametra).
2. Oni metas ĝin en metalan keston kovritan per argilo 70 centimetrojn dika, kaj metas ĝin en la teron pli ol 300 metrojn profundan.

Laŭ la klarigo de la registaro, tiu subtera deponejo estos 6~10 kvadratajn kilometrojn vasta kaj en ĝi estos konservataj pli ol 40 mil miksaĵoj de nukleaĵoj kaj vitro. La tuta konstrukosto estos 3 000 000 000 000 enoj (30 000 000 000 eŭroj).

Oni antaŭvidas, ke por elekti la lokon oni bezonos 20 jarojn kaj por konstrui ĝin, 10 jarojn. Dume certe okazos forta kontraŭmovado kaj okazos neantaŭvideblaj baroj. Tial oni bezonos pli ol 30 jarojn, aŭ minimume 50 jarojn. Krome neniu garantias, ke dume ne okazos aliaj gravaj akcidentoj en la centraloj, aliaj kataklismoj kaj militoj. Nukleaj centraloj farados grandan danĝeron al Japanio, sed aĉaj politikistoj plu kredas kaj kredigas al la popolanoj, ke nukleaj centraloj estas sekuraj kaj elektro el ili estas malmultekosta. Vere stultuloj!

HORI Jasuo



# Sirio: en areo sieĝata apud Damasko, malsatego disvastiĝas pro manko de humanitara konvojo

La lastaj venkoj de la reĝimo de Baŝar Al-Asad kontraŭ la Islama ŝtato ne devas kaŝi la ekscesojn kontraŭ la civiluloj. Tio estas la mesaĝo de la humanitaraj organizaĵoj, kiuj emfazas la ekzemplon de Orienta Gutao.

La siria reĝimo forpelis la grupon IŜ el *Abu Kamal*, ĵaŭdon 9an de novembro. Tiu siria urbo estis la lasta, kie regis la terorisma organizaĵo. Semajnon antaŭe, Damasko rekonkeris *Dejr Alzoro*, plej gravan urbon oriente de la lando. Sed la humanitaraj organizaĵoj timas, ke tiuj anoncoj forgesigos la suferon spertitan de la loĝantoj en kelkaj areoj de la lando, kiel Gutao, en la damaska ĉirkaŭaĵo.

Tiu areo, kie vivas 350 000 loĝantoj, kaj regata de la ribeluloj luktantaj kontraŭ la reĝimo, suferis en aŭgusto 2013, pri atako per sarino: preskaŭ 1 500 mortintoj, laŭ Usono. De tiam, la bombadoj estas preskaŭ kontinuaj, sur la bazarojn, la lernejojn aŭ la malsanulejojn. Sed ia perforto multe pli insida ĉefe ekzistas: malsato.

**UN timas katastrofon**

En ĉirkaŭita Gutao, la humanitaraj kamionoj tre malmulte eniras. Ĉi tie mankas nutraĵoj kaj medikamentoj. La aktivuloj cirkuligas fotojn de skeletaj infanoj. Pluraj beboj jam mortis, pro manko de lakto. Ĵaŭdon [09 nov 2017], UN postulis evakuadon de 400 malsanuloj, kiuj riskas malsategon, el kiuj 29 en mortodanĝero. Mohammad Alolaiwy, prezidanto de *Syria Charity*, NRO kiu helpas la sieĝatajn personojn, konfirmas tion: «preskaŭ neniu humanitara konvojo sukcesis enriri».

«Tiuj ĉi temoj meritas diskonigon, li daŭras, multe pli ol unu aŭ du urboj rekuperitaj fare de la siria reĝimo». Reĝimo «kiu uzadas la samajn metodojn ol la teroristoj de IŜ».

Fine de julio, Rusio tamen anoncis, ke militinterrompiĝo estis subskribita kun la moderaj ribeluloj. Ĝi neniam estis aplikita. Proksime al vintro, la situacio en Gutao riskas pligraviĝi. UN timas katastrofon.

Neniam Milito Inter Ni

# Nombro de mortintoj kreskis ĝis 207 en Irano post tertremo

La novaĵ-agentejo *Tasnim* raportis lunde [13 nov 2017], ke almenaŭ 207 homoj mortis pro la fortega tertremo, kiu trafis la iraka-iranan landliman regionon dimanĉe [12 nov 2017].



La 7,3-magnituda tertremo, kies epicentro troviĝis je 103 kilometroj sudoriente de la iraka urbo *Sulaymaniyah*, ankaŭ vundis 1 800 aliajn homojn en pluraj iranaj provincoj proksimaj al Irako. La tertremo estis sentebla en la ĉefurbo Tehrano kaj pluraj iranaj provincoj proksimaj al Irako.

Pli ol 20 vilaĝoj en la irana provinco *Kermanshah* estis difektitaj, kun rompitaj elektra kaj akva liveradoj. Pli ol 30 iranaj krizokazaj teamoj estis senditaj al la regiono trafita de la tertremo, kaj helikopteroj transportis bazajn bezonaĵojn al tiuj trafitaj de la katastrofo.

La magnitudo de la tertremo, raportita de lokaj amaskomunikiloj, varias de 4,5 ĝis 7,3. La tertremo estis sentebla ankaŭ en Turkio, Armenio, Saud-Arabio, Kuvajto kaj Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj.

Esmail NAJAR, la estro de la Irana Nacia Organizo pri Traktado de Katastrofoj, diris, ke pli da vunditoj eble estos trovitaj sub la ruboj en la gubernio *Qasr-e Shirin* de la provinco *Kermanshah*.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Kunikloj ĉefrolas en pola kampanjo pri naskemo

Ministrejo pri Sano en Pollando ekkonatigis reklamanfilmeton enhavantan kuniklon kiel ĉefrolulon, kadre de kampanjo pri naskemo, kiu instigas la loĝantaron al generado de pli da idoj. Alude al fekundeco, tiu filmeto sugestas, ke la poloj sin inspiru per la kunikloj.



En tiu 30-sekunda anonco, iu kuniklo instruas kiel estigi grandan familion. Sannutrado, korpekzercado kaj malmultstreĉiĝo estas inter la konsiloj de la rakontanto. La bildoj ankaŭ prezentas paron ĉe romantika pikniko.

“Se vi ĉiuj deziras iĝi gepatroj, vi sekvu nian ekzemplon. Mi tute certas pri mia konsilo. Mia patro naskigis 63 idojn”, tion asertas iu kuniklo de la reklamo.

Laŭ informoj de Monda Banko, Pollando havas naskindicon inter la plej malaltaj en Eŭropo, kaj ĝia loĝantaro malpligrandiĝas ekde fino de la 1990-jardeko. En la jaro 2015-a la loĝantaro de Pollando nombris 38 milionojn.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

# Komputiloj por solvi mondan nutroproblemon

La tutmonda agrikulturo povus nutri 825 milionojn pli da homoj ol hodiaŭ, se la agrikulturaj areoj estus optimume ekspluatataj. Signife pli la tuberaj fruktoj kaj pli da ternuksoj kaj da sojo estu plantataj, kaj aliflanke malpli da maizo, da rizo, da milio, da sukerkano kaj sukerbetoj, sed precipe malpli da tritiko. Tion elkalkulis sciencistoj de la universitato de Virĝinio en Usono.



Estas kontribuo al intensa pridiskuto: Ke la mondo post kelkaj jardekoj bezonos sufiĉe da nutraĵoj por naŭ miliardoj da homoj, tio jam delonge okupas agrosciencistojn. Iliaj ideoj koncernas ĉefe tri agadkampojn: optimumigi la produktivon de la ekzistantaj agrikulturaj areoj, bremsi malŝparon kaj malaltigi la kvoton de bestodevenaj nutraĵoj. Sed la sciencistoj el la universitato de Virĝinio nun prezentas novan ideon: Farmistoj povus ŝanĝi siajn kampajn fruktojn por pli bone mastrumi la disponeblajn fontojn, nome precipe akvon.

La esploristoj transdonis tiun optimumigan taskon al komputilo. Ĝi elkalkulu por ĉiu ŝtato la plej bonan mikson el 14 kutimaj agrofruktoj kiuj ampleksas proksimume tri kvaronojn de la mondskala kultivado. Temas precipe pri bazaj nutraĵoj; oni preterlasis kultivareojn por fruktoj, legomoj kaj faboj. "Se oni transiras al plantoj kun malpli da bezono pri akvo, sed kun pli alta nutra valoro, tiam eblas maksimumigi la rikoltojn", diras sciencisto. Sojo kaj ternuksoj ekzemple liveras aparte multe da proteinoj. Tuberoj havas malpli grandan nutran valoron en kilogramo, sed la elhektara rikolto estas tre alta. Ĉiuj tri plantoj ofertas avantaĝojn kompare kun la soifaj kampoj por maizo, rizo kaj tritiko.

En la kalkula modelo kaj la kvoto de la produktotaj proteinoj povas plialtiĝi je 19 procentoj kaj la kvanto da kalorioj je 10 procentoj, kaj aliflanke la tutmonda konsumo de akvo povus reduktiĝi je proksimume unu okono. Preskaŭ triono de la entuta elŝparo koncernas Hindion. Ĉilio laŭ la kalkulmodelo povus redukti sian irigacion al dekono; Israelo bezonus tiam je 51 procentoj malpli da pluvakvo, la Sudano eĉ preskaŭ je 70 procentoj. Kaj la metodo ne kondukos al monokulturoj, substrekas la esploristoj, ĉar ilia modelo konsideras ankaŭ diversecon, kvaliton de la grundo kaj la kvanton da nutraĵoj por bestoj.

Ne ĉiu lando ricevas la saman recepton, parte la rekomendoj kontraŭas al la tutmonda tendenco: Ekzemple Germanio anstataŭu la duonon de la produktado de tritiko kaj trionon de la produktado de sukerbetoj per maizo, terpomoj kaj betoj. La tuberoj laŭ la modelo povus liveri sesoble pli da rikolto ol ĝis nun. Kolzon la komputilo reduktis favore al sunfloroj, sojo kaj milio. Fine la germana agrikulturo konsumus je proksimume 10 procentoj malpli da akvo kaj produktus je 9 procentoj pli da kalorioj kaj je 12 procentoj pli da proteino.

Al aliaj landoj helpus multe pli grandaj


ŝanĝoj: Etiopio povus sesobligi sian produktadon de proteino kaj povus duobligi la nombron de kalorioj, se oni kultivas grandkvante ternukson kaj sojon kaj rezignas aliflanke pri maizo, milio kaj tritiko. Pakistano draste reduktu aldone al la tri specoj de grenoj la produktadon de sukerkano, sed produktu anstataŭe 18-oble pli da sunfloroj, 23-oble pli da tuberoj kaj 47-oble pli da ternuksoj ol ĝis nun. Aŭstralio devus plialtigi sian rikolton de terpomoj eĉ je la faktoro 220, sed devus forstreki preskaŭ plene la produktadon de tritiko. La lando tiam produktus duoble pli da kalorioj kaj pli ol trioble pli da proteino.

La elkalkulita modelo tamen nur estas unua paŝo por ricevi pli klaran bildon pri la eblecoj de la estonta agrikulturo. Necesos adapti la modelon al bezonoj de la homoj en la koncernaj landoj. Ekzemple en Italio ne eblus anstataŭi la produktadon de tritiko per terpomoj. La homoj tie ja daŭre volas manĝi pastaĵojn.

Esperanta Retradio

## La koro de Chopin, de 170 jaroj en poto, diras la kaŭzon de lia morto

Ripozi trankvile en sia tombo jam delonge ne havas garantion. Kelkfoje la tuta korpo de la mortinto restas publike ekspoziciata. Ekzemple estas la kadavro de Lenino, kiu ĝis hodiaŭ restas enbalzamigita (kaj montrata) en maŭzoleo en Moskvo.



En aliaj okazoj konserviĝas nur unu korpoparto. Memoru pri la cerbo de Einstein, kiu estis eltirita el lia kapo sep horojn post lia morto, kaj estigis tiom da esploroj, ke ĝi skribigis eĉ artikolon en Vikipedio.

Ankaŭ la komponisto Frédéric Chopin estas ekzemplo de iu, kiu postlasis korpoparton sian post la morto. Li transiris al la pli bona mondo (forpasis) en 1849, aĝante nur 39 jarojn. Li lasis post si eternecan verkaron, krom... sia koro.

Pro peto de la muzikisto, tiu organo estis eltirita antaŭ lia entombigo en Parizo, kaj estis forportita de lia fratino, en poto kun alkoholaĵo (probable konjako), al katolika preĝejo en Varsovio (la ĉefurbo de Pollando), lia naskiĝurbo. Ĝi restas tie ĝis hodiaŭ, sub la jena biblia epigrafo: “kie estas via trezoro, tie estos ankaŭ via koro” (Mateo, 6:21).

Nun, ne eltirite el la poto, tiu eksterordinara mortrestaĵo el la romantika periodo estis uzata por sciigi la veran kaŭzon de la morto de tiu virtuozo. Antaŭ ol ekzameni ĝin, la skipo de la esploristo Michał Witt, de la Akademio pri Sciencoj de Pollando, sigelis la vazon per vakso, por bari eblan elvaporiĝon. Post tiom da tempo la organo fariĝis fragila, kaj ia ajn kontakto kun la ekstera medio povas detrui unu el la plej valoraj relikvoj de la pola kulturo.

Tiu procedo de neordinara nekropsio okazis antaŭ tri jaroj, preskaŭ en sekreto, sed nur nun la rezultatoj estas diskonigataj.

Fonto: *https://super.abril.com.br/ciencia/coracao-de-chopin-ha-170-anos-num-pote-diz-causa-de-sua-morte/*

Josenilton
jotakaeme.blogspot.com



## Adam OEHLENSCHLÄGER


**Adam (Gottlob) OEHLENSCHLÄGER (naskiĝis la 14-an de novembro, 1779, mortis la 20-an de januaro, 1850) estis dana poeto kaj verkisto de spektakloj. OEHLENSCHLÄGER interalie verkis la danan nacian himnon *Der er et yndigt land* (Ho, vi ĉarmega land') kaj la konatan poemon *Guldhornene* (La oraj kornoj). Oni konsideras lin la lanĉinto de romantismo en Danio, kaj li freŝe novigis la Danan poezian lingvaĵon.**

**En Esperanto aperis: *Aladdin; Hakon Jarl; Printempa himno; La dana nacia himno.***

**Vikipedio**

---

## August ŠENOA



**August (Ivan Nepomuk Eduard) ŠENOA (origine Skönoa, la 14-an de novembro 1838 ; La 13-an de decembro 1881) estis Kroata romanverkisto, kritikisto, redaktisto, poeto, kaj dramisto.**

**En Esperanto aperis: *Dianto de la tombo de poeto; La Trezoro de l' Oraĵisto*.**

**Vikipedio**

---



## Bildo de la tago

***Sicalis flaveola*, *Pantanal*,**

**Brazilo.**

**Vikipedio**